Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 2-an de novembro 2023 per Zoom

Ĉeestis Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 21-an de septembro 2023
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Interna kaj alekstera informado

Norvega Esperantisto: Ni havas kapaciton por eldoni nur unu plian numeron en 2023. En 2024 ni planas eldoni tri numerojn de Norvega Esperantisto (vintre, frusomere kaj aŭtune). Norvegan Esperantiston redaktos Claude.

Reta novaĵletero: Ni intencas ekde 2024 dissendi al la membroj ĉiujare minimume ok retajn novaĵleterojn. La novaĵleteroj povas enhavi tekstojn en Esperanto kaj en la norvega lingvo. Kelkaj novaĵleteraj tekstoj povas esti uzataj ankaŭ en Norvega Esperantisto, en nia retpaĝo kaj en nia paĝo en Facebook. La novaĵleteroj povas enhavi interalie prezentojn de retejoj. Judith P. Abrahamsen faros la fazonon kaj helpos pri uzo de servilo. Se ni volos uzi fotojn en la novaĵleteroj, ni atentu pri la uzrajtoj. La novaĵleterojn redaktos Bård.

Havigo de retpoŝtaj adresoj de membroj: Ni plulaboros por havigi al ni retpoŝtajn adresojn de la membroj. Ni diskutis, kiugrade ni estas limigitaj de eventualaj leĝoj, kiuj koncernas la rajton de organizaĵoj dissendi regulajn, retajn novaĵleterojn al siaj membroj sen anticipa konsento de ĉiu membro. Bård telefonos al Datatilstynet pro prezenti nian situacion kaj ricevi precizan respondon al niaj demandoj rilate al kolekto kaj uzo de retpoŝtaj adresoj de niaj membroj.

Retpaĝaro: Jardar prizorgos la ĝisdatigon de la retpaĝaro (kies celgrupo estas ankaŭ nemembroj), interalie kun atento al la korektpropono de Bård de 15.02.2023. Indas pripensi, kiel plej facile transigi tekstojn de la novaĵleteroj al la retpaĝo, kaj ĉu por plimodernigi la aspekton de la retpaĝaron ĝi funkciu laŭ la «karusela» principo (kun kelkaj tekstoj, kiuj periode ŝanĝas lokon inter si).

4. Reteno de membroj.
Bård dissendos paperpoŝtan memorigilon al la 22 membroj, kiuj ne pagis sian kotizon por 2023. Ĉar baldaŭ estos jarfino, ni proponos al la nepagintoj transsalti unu jaron kaj pagi nur la kotizon por 2024. Eventuala deziro ŝanĝi (malaltigi) la kotizon pro reduktita eldono de Norvega Esperantisto estus traktenda dum landa kunveno.

5. Banko
Por ricevi pli da interezoj ni decidis plene transiri de DNB al BN Bank. Claude estu administranto de la kontoj en BN Bank. Ankaŭ Bård kaj Jardar havu disponrajton.

6. OD-dagen
Pro manko de organiza tempo de lokaj Esperanto-aktivuloj ne okazis la planita agado dum OD-dagen.

7. Eventualaĵoj
Al Lars venis pruntopeto de Esperanto-aktivulo en Afriko. Ni decidis ke NEL ne povas pruntedoni monon al li, interalie ĉar ni konsideras ke NEL ne povas pruntedoni monon al unuopuloj.

8. Venonta estrara interkonsiliĝo:
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 7-an de decembro je 20.30.

Protokolis Marianne Lund